



**MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"**

**INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORJA - DIREKTORO: RAMON DE SALAS**

**Administrazio kaj Redakcio: Str. RODA, n.º 14-16**

## BLUAJN OKULOJN ŜI HAVIS

RICARDO DE LEÓN

### I

Bluaj okuloj de l'ciel' envio,  
 Blondaj bukloj aspektantaj kiel or',  
 Dolĉa, milda rido, ja angela plor',  
 Fajraj lipetoj kaj, ĉe l'kor', glacio.  
 Estis ŝi ĉe mi, gaja knab' beltempa,  
 Katinet' afabla, kvazaŭ gajtintil',  
 Ŝi dum miaj noktoj ŝajnis muzikil',  
 Luna heleco, najtingal' printempa.  
 Ombroj, kaj fine, dornoj, amareco,  
 Akcipitraj ungoj, el infer' brulaĵ',  
 Dentoj pro sango plenaj de ruĝeco.  
 Ŝi kaptitŝnuro siajn buklojn igis,  
 En okulojn miajn l'okulbluon ŝi  
 Kvazaŭ ponardon akre penetrigis.

### II

Ciaj allogoj monstraj min katenas,  
 Kisparfum' la cia sopirigas min,  
 Kial cia gal' rozodorigas cin?  
 Kial veneno laŭ odor' jasmenas?  
 Ciaj Satanflugiloj kial ŝajnas  
 De anĝel' kaj cia nigr' ĉielbluec'?  
 Kial, kvazaŭ ĉe l'pantero, ja belec'  
 Ciaj makuloj por delog' fiŝajnas?  
 Same Satan' en la profunda regno  
 De l'mallumo abomenas kun koler'  
 Siajn ĉielornamojn per mallbeno.  
 Kaj li ankoraŭ havas ĉe l'okuloj  
 La ĉielon, kie estis dum feliĉ'  
 Kaj ĉe l'flugiloj, forton de Diuloj.

*El la hispana tradukis,*  
 RAMON DE SALAS.

## EL « KIHOTO »

(Daŭrigo)

Don Kihoto ne detenis sin de rido pro la simplanimeco de sia armservisto kaj tiel li deklaris al li, ke li tre bone povas plendi kiel kaj kiam ajn, volonte aŭ sendezire, ĉar ĝis tiam li estis nenion leginta kontraŭ tio en la kavallira leĝaro. Tiam Sanĉo Panza diris al li, ke jam estas tempo por manĝi. Lia mastro respondis, ke li mem ne sentas bezonon, ke li manĝu laŭ sia bontrovo. Kun tiu ĉi permeso Sanĉo aranĝis sin kiel eble plej bone sur sia azeno kaj prenitante el la dusako, kion li estis tien enmetinta, li tre plaĉe mangadis vojirante post sia mastro kaj iam post iam li levis sian vinujon por eltrinki tiel plezure, ke la plej regalama drinkejmastro el Malago povus lin envii. Dum li tiamaniere plioftigis la vinekglutojn, li ne rememoris pri ia promeso farita al li de sia mastro, nek trovis labordona, sed tre ripoziga, la serĉadon de aventuroj, eĉ plej danĝerhavaj. Entute ili pasigis tiun nokton inter kelkaj arboj, kaj el unu don Kihoto desiris sekan branĉegon, kiu povis preskaŭ taŭgi kiel lanco, en kiun li almetis la feraĵon prenitatan el la rompita lanco. La tutan nokton maldormis don Kihoto, revante pri sia amatino Dulcineo, por alkonformiĝi al tio, kion li estis leginta en siaj libroj, kiam la kavaliroj sendorme pasigis multajn noktojn en arbaroj kaj senhomlokoj, sin amuzante per rememoro al siaj amatinoj. Sanĉo ne pasigis tiel la nokton, ĉar sentante sian stomakon plena, ne per cikoria infuzajo, li dormadis seninterrompe, kaj se lia mastro ne estus lin vokinta, lin elveki ne efikus la sunradioj trafantaj en lian vizagon, nek la kantado de la birdoj, kiuj multenombro kaj tre gaje salutis la alvenon de novtago. Levigante, li palpis sian vinujon, kaj trovante ĝin iom pli maldika, ol la antaŭtagon li sentis korpremiĝon, ĉar al li ŝajnis, ne esti sur vojo ripari baldaŭ tian mankon. Don Kihoto ne volis matenmanĝi; kiel dirite, li obstinis sin nutri per plaĉaj rememoroj. Ili daŭrigis sian komencitan vojiradon al Puerto Lápic kaj ĉirkaŭ la tria horo ili ekvidis tiun lokon.

—Tie ĉi, diris tuj don Kihoto, ni povas, frato

Sanĉo, ĝiskubute meti la manojn en tion, kio nomiĝas aventuroj; sed atentu, ke eĉ vidante min en plej grandaj danĝeroj, vi ne ekprenos vian glavon por min defendi, se nur vi ne konstatus, ke la ofendantoj estas kanajloj kaj malsatinduloj, ĉar tiaokaze vi povas ja min helpi; tamen, se ili estus kavaliroj, estas tute ne permesite al vi de la kavaliro leĝaro min helpi, ĝis kiam vi estos armita kavaliro.

—Estu certa, Sinjoro, respondis Sanĉo, ke Via Moŝto estos obeita, tiom pli, ke mi nature estas pacama kaj malamiko enmetiĝi en bruadojn kaj batigojn; tamen rilate al mia persona defendo, mi ja ne multe atentos tiujn leĝojn, ĉar la diaj kaj homaj permesas, ke ĉiu defendu sin kontraŭ iu volanta lin ofendi.

—Mi ne diras alie, respondis don Kihoto, sed pri tio; min defendi kontraŭ kavaliroj, vi devas deteni vian naturan vivegon.

—Mi promesas, respondis Sanĉo, tion fari kaj tiun ordonon mi plenumos, kiel la dimanĉan feston.

Ĉe tiuj interdiroj ekmontriĝis sur la vojo du religiuloj, el Sankta Benita anaro, rajdantaj sur du dromedaroj, ĉar ne malpli altkreskaj estis du mulinoj, kiuj ilin portis. Ambaŭ religiuloj sin ŝirmis per vojiraj okulvitroj kaj sunombreloj. Post ili venis veturilo, kun kvar aŭ kvin akompanaj rajdantoj kaj du piedirantaj mulservistoj. Kiel oni poste sciis, en la veturilo sidis vaska Sinjorino, vojiranta en Seviljon, kie loĝis ŝia edzo, tuj vojaĝonta en Hindujon por tie plenumi tre honoran oficon. La religiuloj ne apartenis al ŝia anaro, malgraŭ ke ili iris sur la sama vojo. Tuj kiam don Kihoto ekvidis ilin, li diris al sia armservisto:

—Se mi ne eraras, tiu ĉi estos la plej fama iam vidita aventuro, ĉar tiuj nigraj homfiguroj, tie elvidiĝantaj, estas kredeble kaj sendube iaj sorĉistoj, kiuj kaptite kondukas principinon en la veturilo, kaj estas necese ke mia tuta povo malfaru tiun ĉi maljustaĵon.

—Tio ĉi ekŝajnas pli malbona, ol la ventmuelliĝoj, diris Sanĉo. Vidu, Sinjoro, ke tio estas religiuloj, el Sankta Benita anaro, kaj la veturilo apartenas al preterirantaj personoj. Vidu, kiel mi diras, kaj bone atentu, kion vi tuj faros, se ne, la diablo vin eltrompos.

—Mi jam diris al vi, Sanĉo, respondis don Kihoto, ke vi malmulte scias pri aventuraj aferoj. Vero estas, kion mi diris kaj vi tuj konvinkigos. Ĉi tion dirinte, li antaŭeniris, sin metis mezen de la vojo, sur kiu venis la religiuloj, kaj kiam li kredis ilin sufiĉe proksimaj por povi lin aŭdi, li sin turnis al ili, laŭdirante: Diablaj kaj monstraj personoj, lasu tuj liberaj la altrangajn principinojn, kiujn vi perforte kondukas en tiu veturilo, se ne, pretigu vin ricevi tujan morton, kiel justan punon por viaj malbonaj faroj.

(Daŭrigota).

## P E T O

Ĉar nia provizo de versaĵoj fariĝis ja malabunda, ni ĝoje ricevos originalajn aŭ tradukitajn poeziverkojn por la koncerna rubriko, kondiĉe, kompreneble, ke ili estu akcepteblaj.

Tiacele ni konsilas la *novulojn*, ke ili antaŭe tralegu la "Versfaradon" de Komplete Gramatiko aŭ ion analogan.

Koran antaŭdankon al la sendontoj.

## KARA REDAKCIO

Ĉi tiun verketon mi dediĉas al giganta laborado entreprenita de malgranda popolo. Mi aludas la sekigadon de la suda maro. Kiam kaj kiel la suda maro estiĝis, oni ne precize scias. Laŭ la historio oni povas nur konstati, ke norde de la rivero Rejno ekzistis larĝaj maroj; la Flevomaro en tiam tempo la suda parto de la suda maro kaj la Wiringer maro, tiam la norda parto de la suda maro. Inter tiuj maroj kuŝis tero. Ĉiujare la maroj forrompis grandajn pecojn de tiu tero kaj finfine ĝi tute malaperis. Tiamaniere estiĝis la suda maro kaj en la 15<sup>a</sup> jarcento ĝi havis sian nuntempan formon. Jam multfoje oni parolis en la Nederlanda parlamento pri la ebleco repreni la perditan teron de la maro kaj en la jaro 1918<sup>a</sup> oni decidis tion klopodi. Jam en la jaro 1919<sup>a</sup> oni komencis labori al tiu peza tasko. Unue oni konstruis digon de la provinco Nord-Holando ĝis la insulo Wiringen. Kiam tiu digo estis preta oni ekkonstruis digon de la insulo Wiringen ĝis la provinco Frislando. Ankaŭ ĉi tiu digo jam longe estas preta kaj servas kiel trafikvojo inter la provincoj Nord-Holando kaj Frislando. Ĝi estas longa 34 kilometrojn, larĝa 40 metrojn kaj alta 7 metrojn. Imagu, ke vi staras al la marbordo dum ventego, vidante maron preskaŭ nesondeble profundan kun ondoj domaltaj, kaj pripensu, ke homoj konstruos digon tra tiu infero, tiam vi certe pravigos min, kiam mi tion nomas "gigantan laboron". Vi povas kompreni, ke tiu tasko estis pezeza kaj la laboristoj renkontis multe da malfacilaĵoj. Plurfoje okazis, kiam la inĝenieroj kaj laboristoj estis laborintaj tagon post tago kaj semajnon post semajno, la maro dum unu nokto detruis la plenan laboron. Tamen ili pretigis sian taskon. Kial oni unue konstruis digon, dum ĝuste tio estis la plej peza tasko?

Tiamaniere oni unue akiris enlandan maron, kies akvo poste povas taŭgi por la stontaj loĝantoj de la polderoj kaj due oni retenis la ondojn de la maro, kiuj do ne povas atingi la konstruotajn digojn ĉirkaŭ la farotaj polderoj.

Ĉi tiu enlanda maro nomiĝas Isellago. Unu polderon—la malpli grandan—oni jam sekigis. Ĉi tiu poldero havas 20000 hektaran supraĵon. Kvankam ĝi estas la malplej granda el la kvar sekigitaj, ĝi tamen estas la plej granda de la tuta mondo.

En la jaro 1934<sup>a</sup> oni eklaboris al la Nord-Orienta poldero, kavanta 53000 hektaran supraĵon kaj poste sekvos la Sud-Okcidenta kaj la Sud-Orienta, kiuj respektive havos 56000 kaj 96000 hektaran supraĵon. Nederlando do gajnos 225000 HA da kulturgrundo. En la jam pretigita poldero oni rikoltis grenon, hordeon kaj sekalon. Tie, kie iam bruegis la maro kaj ŝipoj pereis, kie iam 3000 fiŝistoj vivis sian moderan vivon, povos post kelka tempo vivi 300000 homoj, kiuj tie trovos laboron por siaj manoj kaj panon por siaj hejmanoj. Ni Nederlandanoj opinias, ke la inĝenieroj kaj laboristoj rajtas esti fieraj pri tio, kion ili ĝis nun faris. Ĉu vi samopinias?

Tutkore via

W. Slotegraaf.

## LEGENDO DE LA REJNO

**Karlo la Granda kaj la pigmeo «Elbegast»**

Kiam Karlo foje estis en sia nove konstruita kastelo apud Mainz, li nokte havis strangan sonĝon. Anĝelo malsupreniris el la ĉielo kaj ordonis al li tuj eliri el sia palaco por ŝteli. La sonĝo ripetigis trifoje kaj ĉiufoje la ordono de la anĝelo estis pli urĝa. Je la tria fojo ĝi profetis al li subitan morton, se li ne tuj obeos la ordonon de Dio kaj faru ŝtelon! La imperiestro forte ektimis. "Ĉu mia hararo kun honoro grizigis por tio", li diris ĉagrenite al si, "ke mi nun, ja maljuna viro, devas esti en miaj propraj landoj fripono kaj rompi miajn proprajn leĝojn?"—Li armis sin kvazaŭ li irus al batalo kaj sekrete foriris el sia kastelo. Post kiam li dum kelka tempo profunde meditante estis migrinta trans la vastan kampon, li malbonhumore sidigis sub arbo. "Instruiston pri ŝtelado mi bezonus", li pensis, "dum mia juneco mi preterlasis igi instrui min pri la arto de friponeco. Mi dezirus, ke Elbegast, la malica pigmeo, la reĝo de ĉiuj ŝtelistoj, estus ĉi tie. Mi ofte pelis lin tra arbustaroj kaj trans erikejoj, jurante, ke mi pendigos lin, kiam mi iam kaptos lin; sed hodiaŭ mi povus bezoni lin!" Jen bruetis en la arbustaro kaj Elbegast staris antaŭ li. "Mia altranga sinjoro", li diris kun respekta riverenco, "anĝelo ordonis al mi, helpi vin hodiaŭ nokte. Sed, se vi volas ŝteli, vi ne estu forte armita, ĉar kasko kaj kiraso brilas en la mallumeco, kaj glavovo povas brui. Pro tio mi permesis al mi, ŝteli viajn batalilojn kaj reporti ilin en la palacon!" Surprizita Karlo rigardis sin kaj rimarkis kun miro, ke li estas sen kiraso kaj bataliloj. "Mi rekonas vin kiel majstron", li diris ridante, "sed nun diru al mi, kie ni povas ŝteli?"—Fervore la malgrandulo montris en la mallumecan. "Transe, kie la lumeto briletas", li diris, "loĝas riĉa grafo. Li estas nomata "Harderich" kaj estas fiero, potenca sinjoro, sed malbona homo. Ĉe li ni povas ŝteli".—La imperiestro konsentis, kaj ambaŭ sekrete kaj ne malhelpite penetris en la kastelon de Harderich, ĉar antaŭ la sorĉpova pigmeo malfermiĝis ĉiuj pordegoj aŭtomate. Dum Elbegast ŝteliris en la stalon por ŝteli la ĉevalon de la grafo, Karlo senbrue iris tra ĉiuj ĉambroj kaj venis al kurteno, post kiu dormis Harderich kaj lia edzino. Dum kiam li ankoraŭ pripensis, kion li kunprenu, la ĉevalo blekis en la stalo, kaj Harderich eksaltis el sia kuŝejo. Li voke venigis serviston kaj sendis lin al la stalo, por kontroli la virĉevalon. Kiam la servisto ĵus estis reveninta kaj anoncinta, ke ĉio estas en ordo, la ĉevalo blekis la duan fojon. Nun Harderich mem iris en la stalon, ĉar lia ĉevalo estis al li treege kara. Sed Elbegast estis laŭlonge metinta sin sur tegmenta trabo kaj kiam ajn la grafo esploris kaj serĉis, li ne trovis iun. Kiam li poste revenis al sia edzino, ĉi tiu diris: "Mia kara edzo, ne povas esti nur la zorgo pri via ĉevalo, kiu ne lasas dormi vin, ĉar vi jam dum tri tagoj ĉirkaŭiris maltrankvile, kaj apenaŭ dormis, nek manĝis, nek trinkis. Diru do al mi, kio vin premas".

Harderich malafable igis silenti ŝin, sed ŝi insistis petegis lin tiel longe, ke fine li ne plu povis kontraŭstari. Li igis ĵuri ŝin gravan ĵuron, konservi la danĝeran sekreton kontraŭ ĉiu, kaj poste raportis al ŝi, ke li interkomplotis kun tri aliaj

grafoj, mortigi la imperiestron. "Morgaŭ ni kvar rajdos al la kortego", li diris, "kaj pretekstante, ke ni devas transdoni sekretan informon, ni interparolos kun la imperiestro sen atestantoj kaj mortigos lin per niaj ponardoj".

Karlo, kiu, dum la tuta tempo bone kaŝite staris post la kurteno, aŭdis sufiĉon. Senbrue li eliris kaj ŝteliris en la stalon. Al li senreziste obeis la ĉevalo de Harderich, kiu timis nur la strangan figuron de la reĝo de la pigmeoj. Li kondukis ĝin eksteren, surseligis sin kaj rerajdis en sian kastelon.

Kiam la kvar murdontoj en la sekvinta mateno rajdis en la palacon kaj deziris paroli kun la imperiestro, ili tuj estis kaptataj kaj malarmataj. Ĉar ili vidis malkaŝita sian komploton, ili humile konfesis sian kriman intencon kaj tuj estis pendigitaj.

Sed la imperiestra kastelo, en kiu Karlo havis la vizon de la anĝelo, pro dankema memoro estis nomata "Engelheim" (anĝelhejmo), el kiu la homoj poste, kiam ili estis forgesintaj la devenon de la nomo, faris "Ingelheim". Elbegast ricevis la riĉaĵojn de Harderich kiel donacon pro sia helpo. Li foriris en alian landon kaj neniam vidigis sin antaŭ Karlo.

*El la germana tradukis,*

E. SCHÜFF.

Berlin-Friedenau.

**«Sango kaj Sablo» kaj Don Indalecio**

En kuracista revuo "La Casa del Médico" antaŭ unu monato aperis artikolo de ĉi tiu klera kaj tre konata en Zaragozo taŭrarta recenzisto kaj ni estas puŝataj traduki el ĝi la jenajn paragrafojn:

"... Kaj la kolektantoj je taŭrartaj libroj havas verkojn en germana, angla, itala, portugala kaj franca lingvoj, plimulte el ili sufiĉe kompetente pritraktatajn.

Unu plua progrespaŝo por malfermi la vojon ĵus estis realigata en nia lando Aragono, kiu ankaŭ aliajn fojojn estis la unua, antaŭirante la okazajojn: tie ĉi ekfunkciis la unua hispana presejo, la unua Advokatkuniĝo, la unuaj socialaj leĝoj...

Antaŭ la paperoj, sur kiujn mi skribas, estas libro ĵus eliginta el Zaragoza presejo. La unua en esperanto temanta pri taŭrfestaj aferoj. Ĝia titolo estas "Sango kaj Sablo", kaj ĝi estas traduko en ĉi tiun lingvon je la romano de Blasco Ibañez "Sangre y Arena".

Mi ne scias, tial ke mi ne konas esperanton, ĉu la traduko de Sro. Ramón de Salas Bonal estas ja trafa. Sed mi tre bone scias, ke mia fervora libroinklino estas ravata antaŭ la kolorriĉa librofasedo de Guillermo kaj ke la libro bonege aspektas inter la ceteraj en la bretoj de mia multnombra taŭrarta biblioteko en kiu estas grandkvante fremdlingve verkitaĵaj libroj. Sed en esperanto estis neniu..."

Jen kiel, karaj samideanoj Esperanto iom post iom konkeras ĉion, eĉ la bibliotekojn de la taŭrartaj recenzistoj.

## SPRITAJ JOJ

Senmona poeto volis foje eniri senpage en teatron, kaj tiucele li elpensis ruzajon. Li lokiĝis apud la teatron pardon kaj observis. Li vidas, ke sinjoro diras ion al la pordisto kaj ĉi tiu respektige kliniĝas kaj lasas lin pasi.

La senmonulo decide antaŭeniras kaj diras sentime al la pordisto:

—Mi ankaŭ.

Nu, tio, kion la enirinta sinjoro ĵus diris, estis jena: "Mi estas Jacinto Benavente.

\* \* \*

Se vi volas, ke granda malbono trafu vian malamikon, ne malbenu lin. Prefere deziru, ke virino malamu lin. Tio ĉi estas ja sufiĉa.

\* \* \*

Iu famkonata advokato sukcesis liberigi klienton el tre malbona afero. Post sia malĉamando la kliento iras al li por esprimi sian dankon.

—Ho, mia kara majstro—li diras al li—mi ne scias ja, kiel montri al vi mian tutan dankon.

Kaj la advokato respondis:

—Kara amiko, post kiam la fenicoj elpensis la monon, demandi tion estas nenecese.

\* \* \*

La industriisto S. T., tre malbone edukita homo, manĝas, invitite de amiko, en lia hejmo, kaj pikinte per sia forko pecon da viando li demandis:

—Ĉu tio ĉi estas porka?

Kaj la gastiganto, kies pacienco jam elĉerpiĝis pro la nekonvenaĵoj de la gasto, respondis:

—Nu, pri kio vi demandas? ĉu pri la viando aŭ pri via mano?

## ANEKDOTOJ

Matematikisto Bossut estis agonianta, kiam lia kolego Maupertuis venis al li por informi pri lia malsano. Ĉio estas perdita, oni al li diris, lia stato estas tiel senespera, ke li eĉ ne povas paroli vorteton.—Atendu, diris memfide Maupertuis, mi certigas vin, ke li tuj parolos". Li apudiĝis al la lito, ekklinis sin kaj diris ĉe la orelo de la malsanulo: "Bossut, diru al mi, mi petas, la kvadraton de 12" La mortanto ŝajnis sin eltiri el neniigo kaj klare respondis: "Cent kvardek kvar". Tiu estis liaj lastaj vortoj, ĉar post tiu superhoma peno, li tuj mortis.

\* \* \*

Oni demandis saĝulon Antisteni'n, kian profiton estis li eltirinta el filozofio. "La profiton mi ricevis, diris li, povi interparoli kun mi mem".

\* \* \*

Unu tagon Napoleono I, subite alproksimiĝinta al iu kolonelo, lin demandis: "Kiom da soldatoj en via regimento?—1.225—Kiom da ili en la hospitalo?—1.310.—Bone!" La kolonelo estis tiel rapide respondinta, ke la imperiestro havis nenian tempon por kompari liajn respondojn.

(Piemonto sub la imperiestreco, Rememoroj de ia nekonato).

\* \* \*

Oni demandis la filinon de S-rino Sofio Arnault, kiomaĝa estas ŝia patrino. "Mi jam nenion scias pri tio, ĉar mia patrino, de jaro al jaro sin trovas per unu jaro pli juna: se ĝi daŭros, mi baldaŭ estos ŝia unuenaskita fratino".

(Metra, Sekreta korespondado).

\* \* \*

Lassources, post sia kondamniĝo, citis al siaj ĵuĝistoj tiujn ĉi vortojn de iu antikvulo: "Mi mortas en la momento, kiam la popolo perdis sian prudenton; vi, sinjoroj, mortas, kiam la popolo ĝin rehavos".

(Riouffe, Memorskriboj).

\* \* \*

"Pli da lumo, ĉiam pli da lumo!", jen la lastaj vortoj de Goethe, la eminenta, germana poeto.

\* \* \*

En la momento, kiam Mirabeau estis mortanta, li diris al sia servisto: "Subtenu tiun ĉi kapon, la plej fortan el Francujo".

## AUSTRIA ESPERANTISTO

Ni ricevis la julian numeron de ĉi tiu bela, aŭstra esperanto-revuo, kiu ĉefe sin okupas pri la Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Vieno la proksiman jaron 1936.

En ĝi estas Oficiala Invito de la aŭstra Registaro al la esperantistoj tutmondaj por la partopreno je la 28-a Kongreso, belegaj fotografajoj de la lando kaj de la kongresejo, la iama, Imperiestra Kastelo "Burg", kaj provizora programo, kies skizo estas jena:

1- Vizitvojaĝo tra Aŭstrujo.

2—Teatra prezento je la famkonata opereto "La Blanka Ĉevaleto".

3—Grandioza balfesto kun kostumkonkuro.

La allogo kaj beleco de la lando kaj urbo Vieno, la valora kaj efika apogo de la aŭstra Registaro kaj la entuziasma entreprenemo kaj fervoro de la tieaj samideanoj garantias plenan sukceson de la 28-a Universala Kongreso de Esperanto.

## Nova Esperanto - Societo en Tetuán

En Tetuán (Maroko) oni ĵus fondis novan Esperanto-societon, la duan en tiu lando, titolitan "Bela Stelo".

En ĝi estis tuj aranĝata kurso por la instruado je la internacia lingvo kaj laŭ ricevita sciigo ĝi estas partoprenata de sufiĉe multe da gelnantoj.

Ni tutkore gratulas niajn tieajn samideanojn pro ilia fervoro por nia karega lingvo kaj pro la granda sukceso atingita de ili rilate la menciitan kurson, kiu okazas la mardojn, ĵaŭdojn kaj sabatojn vespere de la 9'30 ĝis la 10'30.

Multe da prospero kaj sukcesado ni deziras al la Tetuanaj esperantistoj.